



La Riverego

Vintro de 1997-98

Esperanto-Societo Kebekia

N^o 49^o, Jaro 12^o

ESK estas 15-jara !

Normand Fleury

Le président de la Société québécoise d'espéranto résume ici les quinze années d'activités de la Société.

Jes ja, estis en septembro 1982 ke deko da esperantistoj entuziasme kunvenis en Saint-Michel-des-Saints por fondi provincan esperanto-asociacion, cetere la unuan en Kanado. Kiai ili volis tion fari? Mi pensas, ke inter la diversaj kialoj, la ĉefa estis certe la intenco rekomendi la enkondukon de Esperanto en la kebekian lernejan sistemon. Tiam estis en Ŝerbruko kaj kurso ĉe la Universitato. Do, la unua tasko estis verki memuaron kaj lerte faris tion for pasinta Profesoro Pierre Collinge. La memuaro estis prezentita al la Kebekia registaro kaj, kvankam Esperanto ne estis enkondukita en la edukan sistemon

ni tamen ricevis pozitivan reagon. La ministerio konsideris Esperanton kiel lingvon (ne kiel fikcian projekton) kaj menciis, ke tie kie estos intruisto kaj peto por ĝin instrui, tie eblos. Tiel okazis en Ŝerbruka mezlernejo.

En la 60^{aj} kaj 70^{aj} jaroj okazadis multaj esperantistaj renkontiĝoj en

Kebekio (Montrealo, Kebeko, Tri-Riveroj, Ŝerbruko) sed komence de la 80^{aj} jaroj tio ĉesis. Alia celo de la nova asocio estis okazigi provincajn renkontiĝojn por ebligi praktikon de la lingvo dum kompleta semajnfino kaj ankaŭ interkonigo de la esperantistaro. Kaj do, ESK kunvenadis jam, krom en la grandaj urboj, ankaŭ en Racine (Estrio), Val-David, Saint-Louis-de-France (norde de Tri-Riveroj), Maskuto (Saint-Hyacinthe), Saint-Irénée (Karlevezio), Kontrekerio kaj

Otavia movado kaj vizitis ilin plurfoje; organizis sukcese en Montrealo la IJK-n (Internacian Junularan Kongreson) de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) en 1992 kaj, fine, 4-foje preparis aŭtunan renkontiĝon en Okemo (Vermonto) kaj invitis la esperantistaron de Toronto ĝis Novjorko, de Otavo ĝis Vaŝingtono kaj de Halifakso ĝis Bostono. En 1998, la renkontiĝo nomiĝos *Okemo 98 — Internacia semajnfino esperantista*.

Fine (kaj certe ne malpli grave) ni varbis kaj informadis tra Kebekio. Multegaj artikoloj (*La Presse, Le Devoir, Dernière Heure, La Voix de l'Est, La Tribune*, kaj multe pli) pri Esperanto aperadis regule

dum la pasintaj 15 jaroj danke al plej diversaj aktivaj membroj de nia societo. Estis ankaŭ multaj televidaj kaj radiaj intervjuoj (SRC, CBC, TVA, CBF, CIBL, CITE, TQS, TQ kaj tiel plu) sed... malgraŭ tio multaj Kebekianoj nenion scias au neniam

sekvo...

Atentu ! Attention !

Ŝanĝiĝis la dato de l' Zamenhofa festo — ĝi okazos **sabato** 20^{an} de decembro, por ke neMontrealanoj povu pli facile ĉeesti tiun vesperon, dum kiu oni celebros la dekkvinjariĝon de la Esperanto-Societo Kebekia. Vidu en pĝ 7^a.

La date de la Zamenhofa festo a été changée au **samedi** 20 décembre, de manière à ce que les non-Montréalais puissent plus aisément assister à cette soirée, à l'occasion de laquelle on célébrera aussi le quinzième anniversaire de la Société québécoise d'espéranto. Lire en p. 7.

plurfoje en Sainte-Catherine-de-Hatley (apud Magogo). Kiel estos estonte? Dependas de vi. Invitu nin semajnfino kun vi en via regiono!

Plia celo estis (kaj estas) rilati kun la aliaj esperanto-movadoj. Ni do invitis KEA kongresi en Kebekio kelkfoje (1987, 1992 kaj 1998); ĝemeliĝis al la

Ĉu vi havas PC aŭ Mac ?

Se vi respondis al tiu demando kaj havas CDROM-legilon, vi feliĉos scii ke aperis la unua komputila kompakt-disko en Esperanto, nome ESPEROM. La disko estas kolektaĵo de plej diversaj Esperanto-materialoj, programoj, tekstoj, sonoj, filmoj kaj legaĵoj. Ĝi estas farita per HTML-tekniko, do iu ajn povas uzi ĝin sen aparta scio pri komputilaj aferoj.

La disko ebligas ne nur legi diversajn tekstojn (E-gazetoj, E-gramatiko kaj -

ekzercaro, kursoj, la Sankta Biblio, Fabeloj de Grimm, Glinda de Oz, Muminvalo, rakontoj por infanoj, ktp) sed ankaŭ povas montri filmerojn pri esperanto-aranĝoj, aŭskulti muzikon de esperantistaj kantistoj (Kajto, Tutmonda Muziko, Ĵak Le Puil, k.a.) aŭskulti fragmentojn el la esperantlingvaj radio-elsendoj (Kubo, Varsovio, Sarajevo, k.a.) kaj multe, multe pli. Do vere varia materialo por komencantoj, progresantoj kaj spertuloj en Esperanto !

Por plene eluzi ĉiujn eblojn de la disko, estas necese havi komputilon 486 DX66 kun minimuma memoro de 4 MB, 12 MB da libera loko sur la malmola disko, sonkarton (Sound-Blaster-kongrua), CDROM-legilon

(min. 2^{ghla} rapido) kaj VGA-monitoron. Kompreneble ĝi funkcias ankaŭ sur malpli rapidaj komputiloj sed la rezultoj estos... malpli rapidaj. ESPEROM estas uzebla precipe per Windows 3.x, Windows 95, MacOS kaj Unix sistemoj. La disko mem enhavas ĉiujn necesajn programojn por la tuja utiligo.

Mendu tuj ĉar ili rapide forvendiĝas. La prezo estas 20 CAD, inkluzive de sendkostoj. Rabato ekde tri diskoj (petu detalojn). Sendu ĉekon aŭ mandaton al : ESK, 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal QC H2G 2R8. Eblas mendi telekopiile je (514) 272-0151. Ne forgesu klare indiki vian kompletan adreson. Dankon.

...ESK 15-jara !

aŭdis pri Esperanto ! Nu, ĉu plori?... ne utilis multe. Nova generacio, nova necesa varbado !

Foje ni (la estraro) sentas malkuraĝiĝon kaj malgraŭ amaso da volontula laboro dum la lastaj jaroj, malfacilas vidi konkretan progreson. Sed kiam, iu rete skribas al ni Esperante post memlernado de la lingvo kaj eblas legi lian entuziasmon pri la lingvo, tiam ni ricevas kvazaŭ dankon. Tiam ni sentas, ke la multegaj horoj dediĉitaj al la movado verŝajne tamen utilis. Kiam ni renkontas junulon kiu uzis la lingvon en Europo kaj spertis belajn amikplenenajn momentojn, tiam ni ricevas energion. Tiam ni havas pruvon, ke la Esperanto-movado estas io valora, utila sed ĉefe homa en la nuntempo ne homeca, moderna, komercema mondo !

Speakez-vous...

funkcii kaj eĉ havi amuzan aspekton. Krome, la finaĵo -anto en *europanto* estas agnosko pri la ekzisto kaj funkciado de nia lingvo.

En individua psikoterapio, kiam rezisto komencas ŝanceliĝi, tre ofte aperas tiaj kompromisaj pseŭdosolvoj, kies funkcio ŝajne estas laŭgrade prepari la menson al radika ŝanĝo de io ĝis tiam netuŝebla. Simile, oni povas vidi en la apero de europanto transiran etapon inter laabela sistemo nuntempa kaj la vera solvo, la nia. La artikolo en *Courrier international* finiĝas per frazo, kiu povas faciligi al la legantoj pripensadon pri la solvo esperanto, nome : « Europa Unio elspezas pli ol 3 miliardojn da francaj frankoj jare por traduki kaj interpreti en la dek unu oficialajn lingvojn ; tiu sumo ŝpariĝus, se ni ĉiuj parolus europanton ». Sufiĉas, en tia propono, legi *esper* anstataŭ *europ* por pasi de la transira mensa sinteno, pure ŝerca, al serioza kaj saĝa konsiderado.

Ni ne ataku europanton, sed preparolu ĝin kiel pruvon pri la graveco de la problemo kaj nekonscian intuicion pri la vojo sekvinda. [El *Interredaktore*]

La Riverego (Le fleuve) est publiĉ par la Societ  qu b coise d'esp ranto en mars, juin, septembre et d cembre. D p ts l gaux : biblioth ques nationales du Canada et du Qu bec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilit  des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopi    110 exemplaires sur papier recycl . Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 110oble sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

 ch ance pour le prochain num ro / limdato por la venonta numero : 1998.03.01.

R dacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collabor    ce num ro / kunlaboris al   tiu numero : Alain Bergeron, Suzanne Bolduc, Monique Cambron, G rald C t , Normand Fleury, Jessy LaPointe, Martin Lavall e, Treffi  Mercier kaj Yvon Roux. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (pr sident / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-pr sident / vicprezidanto), Jean-Claude B langer (secr taire / sekretario), Martin Lavall e (tr sorier / kasisto), Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia / Societ  qu b coise d'esp ranto

6358-A, rue de Bordeaux
Montr al Qu bec H2G 2R8

R pondeur et t l copieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo: (514) 272-0151

normand.fleury@sympatico.ca

<http://www.cam.org/~mmaerten/esk.html>

Le premier espérantiste au Québec

La Société québécoise d'espéranto n'a peut-être que quinze ans, mais l'espéranto existe au Québec depuis déjà plus d'un siècle. Le séminaire de Saint-Hyacinthe possède des documents en espéranto datant de 1893... En effet, le premier espérantiste du Québec, du Canada et semble-t-il de l'Amérique du Nord, a été le prêtre François-Xavier-Isaïe Solis, né à Marieville en 1832, qui, après avoir été curé de plusieurs paroisses, a enseigné la littérature à Saint-Hyacinthe. C'est là qu'il aurait entendu parler de la jeune langue internationale ; et c'est pour cette raison que la S.Q.E. avait organisé le congrès de l'Association canadienne d'espéranto à Saint-Hyacinthe, à l'occasion du centenaire de l'espéranto, en 1987.

Pendant dix ans, jusqu'à sa mort survenue en 1903, il a travaillé à faire connaître l'espéranto. Avec des amis montréalais il a fondé le 1^{er} août 1901 le mensuel *L'Espérantiste canadien*. Après cinq numéros, en janvier 1902, la revue a pris un nouveau nom, *La Lumo*, et a paru en français, en anglais et en espéranto.

Sous la signature de S. P. Ranto, la première page du premier numéro de *L'Espérantiste canadien* présente le père Solis. On verra que certaines choses n'ont pas vraiment changé...

« Le Révérend F. X. I. Solis est certainement le pionnier de l'Espéranto au Canada.

« En effet, il y a déjà quelques années que Mr. Solis entendit parler de l'Espéranto pour la première fois.

« Et sitôt qu'il eut compris en quoi consistait l'Espéranto il se procura immédiatement le manuel français, et après un examen rapide il fut frappé de l'art vraiment étonnant qui avait présidé à la formation de cette langue.

« Dans le cours de la première année d'étude de l'Espéranto, M. Solis s'est peu occupé de faire de la propagande,

se contentant de donner les renseignements qu'on lui demandait et de répondre aux objections qui lui étaient faites.

« Vers le 5 avril 1899 on avertit M. Solis que le journal "La Presse" de Montréal, du 1^{er} avril, avait reproduit dans ses colonnes un écrit de M. André Theuriet, membre de l'Académie française, qui malmenait rudement l'Espéranto. M. Solis était alors le seul Espérantiste au Canada. Convaincu qu'il était de son devoir de répondre à cet écrit, il prépara un long article sur l'Espéranto, qui fut publié dans "La Presse" du 8 avril 1899. Quelques semaines plus tard M. Solis publia dans le "Courrier de St-Hyacinthe" une série d'articles ayant pour titre : "L'espéranto, ce qu'il est, et ce qu'il n'est pas".

« Au mois de mai dernier le Club des

Espérantistes Canadiens, de Montréal, choisit ce monsieur pour président, et il n'y a pas de doute qu'avec un tel homme à sa tête le Club réussira dans toutes ses entreprises.

« Les journaux et l'"Espéranto"

« Nous remarquons que "La Presse", "La Patrie", "Le Temps" et même "Les Débats", contiennent d'assez habiles critiques sur l'Espéranto, mais toutes écrites, malheureusement, avec ignorance de cause. Nous invitons donc MM. les Espérantistes de se servir de nos colonnes pour relever le gant d'une manière efficace. »

On pourra consulter des reproductions de ces anciens écrits lors de la fête du quinzième anniversaire de la S.Q.E.

Speakez-vous el europanto ? C'est mucho fun !

Claude Piron

Sub tiu titolo aperis artikolo en *The Sunday Telegraph*, kiu, francigite, publikigis en *Courrier International* de la 4^a de septembro 1997 (n^o 357, p. 35). Temas pri ŝerca elpensita lingvo, miksaĵo el la diversaj lingvoj parolataj en la europa brusela burokrataro. La ŝercon iniciatis Diego Marani, itala tradukisto deĵoranta ĉe la Europa Ministra Konsilio, kiu publikigis kelkajn specimenojn en la belga gazeto *Le Soir*. Fine de aŭgusto li komencis publikigi novelojn en europanto en la belga semajna gazeto *Le Soir illustré*, kaj ankaŭ kurso komencis aperi.

Kvankam ĉi-lastaj faktoj povus indiki, ke Diego Marani komencas preni sin serioze, la afero restas ŝerco, kiu amuzas multajn bruselanojn, homojn ĝenerale havantajn ian bazan scipovon de la ĉefaj europaj lingvoj kaj do senpene komprenantajn frazojn kiel « Maybe trinques-tu etwas ? No ?

Dommagio ! Was nome tich ? » (Eble vi trinkos ion ? Ne ? Bedaŭrinde ! Kio estas via nomo ?).

Laŭ la artikolo en *Sunday Telegraph*, la apero de europanto estis rigardata kiel atako fare de la esperantistoj. Se tiel estus, oni povus bedaŭri tiun reagon, ĉar ĝi rivelus mankon de humursento kaj nekomprenon pri la psikologia aspekto de la fenomeno.

Fakte, europanto faras al ni grandegan servon. La malfacileco progresigi akcepton de esperanto ja grandparte ŝuldiĝas al psikologia rezisto, bazita sur antaŭjuĝaj rezonoj kiel « Lingvo elpensita de unu homo ne povas funkcii », « Miksaĵo ne havas valoron », « Ne eblas ridi kaj ŝerci en artefarita lingvo », ktp. Nu, europanto atakas tre konkrete tiujn ideojn. Ĝi adaptas la mensojn al la ideo, ke io miksa, iniciatita de unu homo, povas

sekvo en paĝo 2^a...

La Riverego 3

Memorajoj pri Pierre Collinge

(1925-1997)

Tri membroj de Ŝerbruka Esperanto-Societo dividas kun la legantaro de *La Riverego* kelkajn neforgeseblajn memorajojn pri la unike klera kaj aminda homo, kiu estis Petro Collinge.

La kompetenta profesoro

Géraldo Côté

Skribante ĉi tiujn liniojn, estas por mi daŭre malfacile akcepti la malaperon de viro, kiun mi ĉiam admiris : Pierre Collinge.

Mi konatiĝis kun li en septembro 1979, kiam li donis, en la Universitato de Ŝerbruko, la unuan sesion de Esperanto-kurso per la libro *Cours rationnel et complet d'espéranto*. Ekde la komenco, mi sciis, ke Petro estis kompetenta kaj erudicia profesoro, fascinata de la lingvo-problemoj.

En la restoracio kiel en la Universitato, kiom da demandoj ni metis al li pri la franca kaj Esperanto, interalie. Petro, kiu esprimis sin en polurita lingvaĵo sen toleri eĉ malgrandan eraron, tiom amegis la francan, ke li senĉese ornamis siajn respondojn — longajn sed kompletajn — per latinaj kaj grekaj referencoj.

Li paroladis, klarigis kun la energio kaj pasio de tiu, kiu scias. Li ankaŭ povis iom ekkoleri, se oni ŝajne malsamopiniis. Tiam, li provis ĉiাপреze konvinki sian kunparolant(in)on. Tiuj momentoj fariĝis tutsimple sublimaj, neforgeseblaj, ĉar oni neniam laciĝis aŭskulti lin. Sed tiu, kiu havis la okazon penetri lian intimecon, rapide malkovris, ke tiu tre pasia profesoro fakte estis dolĉanima, ĝentila, prizorgema pri la bezonoj de la ceteraj.

Postulema kaj profesia, tia certe estis Petro. Sed li ankaŭ estis tre respektata en sia medio. Estis nenia dubo pri lia kompetenteco. Li publikigis kun Hélène Cajolet kaj Gérard Laganière la manlibron *Rédaction technique*.

Je ĉiu monata renkontiĝo de ŜES (Ŝerbruka Esperanto-Societo), unu el ni preparis societan ludon. Petro dediĉis multajn horojn por ellabori la sian. Ne necesas aldoni, ke oni devis esti inspirata de la dioj por trovi la petitajn respondojn, ĉar li esploris tre profunden la logikon. Se hazarde ni prezentis al li malfacilan ludon por solvi, lia pasio pri defioj instigis lin hejme serĉi ĝismatene la solvon, kiun li tuj poste sendis perpoŝte al la aŭtoro.

Petro estis tiom konvinkita pri la utilo de Esperanto, ke li submetis al la Kebekia registaro memuaron pri « la oportuneco enkonduki la instruadon de Esperanto en la unuagradajn kaj duagradajn lernejojn kiel en la kolegiojn de Kebekio ». Dank' al ĝi, oni povis instrui la Internacian Lingvon en duagrada lernejo de Ŝerbruko dum kelkaj jaroj. Mi nek povas silenti pri la bone strukturitaj lecionoj, kiujn Petro verkis rilate certajn malfacilaĵojn proprajn al Esperanto, kiel ekzemple la distingon inter « iĝ » kaj « ig » kaj la utiligon de la « -n » ĉe la fino de vortoj.

Mallonge, Petro estis profesoro kaj homo, kiun oni ne povus forgesi. Mi ĉiam sentis min en lia ĉesto kiel privilegia lernanto... kiel fakte estis mia filino Ĝenoveva, kiam ŝi sekvis la lastan sesion de Esperanto-kurso donita de Petro dum la printempo de 1992.

La homo malantaŭ la profesoro

Monika Cambron

Skribi en nur kelkaj paragrafoj estas aŭdaca — eĉ pretendema entrepreno — por tiu, kiu deziras prezenti, malkaŝi la homon malantaŭ la profesoro ; mi

tamen provos ekvidigi kelkajn aspektojn, kiuj riveligis al tiuj, kiuj frekventis Petron Collinge ekster liaj profesiaj okupoj.

Ni longe memoros lian delikatecon, malavarecon, ampleksan kulturon kaj muzikan talenton. Delikateco en liaj sintenoj dum niaj renkontoj, kiel delikateco kaj takto en liaj diroj dum viglaj diskutoj. Petro ne forpuŝis la alian sed lasis veni, lasis paroli, sen, malgraŭ tio, subtile infiltrigi por lasi ĉe la alia multe da li mem.

La malavareco de Petro alprenis multajn vizaĝojn, el kiuj kelkaj estas konitaj nur de lia parenkaro. Ni substreku tiun, kiu manifestiĝis, kiam li dediĉis sian tempon al siaj gestudentoj dum privataj renkontiĝoj por ellabori, diskuti, helpi antaŭ malfacilaĵo redakcia aŭ alispeca.

Malavareco ankaŭ dum amikaj renkontiĝoj, kiam li ofte kontribuis multe pli ol sia parto al la ĝajaj festenoj, nome rilate vinon kaj fajnajn kukaĵojn. Malavareco eĉ en liaj diroj. Li povis diskuti tiom longe, kiom necese pri ambigua demando, malkvietiga situacio ; li pritraktadus la subjekton ĝis elĉerpo, se estus necese.

Ĉu estis temo pri kiu vi volus interdiskuti kun Petro Collinge ? Lia ampleksa kulturo estis garantio, ke vi estus kontentigita per la vasteco de liaj konoj, iliaj trafeco kaj profundeco. Vi tiam pritraktus politikon, religion, lingvojn, sciencojn, historion, aktualaĵojn, internaciajn konfliktojn, ktp, inkluzive muzikon !

Por Petro, muziko estis esenca ĉiutaga nutraĵo. Tiu, kiu jam vidis lian kolekton de diskoj kaj kasedoj ne povas dubi, ke muziko vere estis granda

sekvo...

L'espéranto : Jawohl !

Jessy LaPointe

Un billet sans date de retour dans les poches, je suis débarqué à Francfort, le 21 mai 1997, sans savoir où j'allais, ni pour combien de temps. Mais je me sentais quand même en sécurité, puisque j'avais le carnet du *Pasporta Servo* dans mes bagages.

Après avoir passé tant d'années à apprendre l'allemand dans les livres, j'ai décidé d'aller vivre en Allemagne, d'aller prendre le pouls du pays. Je n'y connaissais personne et j'étais sans argent, comme n'importe quel étudiant. Heureusement, j'étais tombé, un an auparavant, sur une méthode d'apprentissage de l'espéranto. D'abord sceptique, je me suis surpris à dévorer la méthode jour après jour, puis à contacter le mouvement espérantiste.

J'étais donc là, au beau milieu de la faune urbaine de Francfort, mais je n'étais pas nerveux : l'espéranto m'ouvrait les portes du pays. Je savais que dans presque toutes les régions de l'Allemagne, je pourrais trouver des gens qui, comme moi, partageaient une langue internationale commune.

J'ai d'abord exploré Francfort, grâce à un premier espérantophone qui m'a hébergé. Soulagé de mes bagages, j'ai apprécié pouvoir me promener dans cette grande ville, entouré de gens qui m'apprenaient l'allemand simplement en me croisant dans la rue.

Puis j'ai quitté la ville pour la province. Je me suis retrouvé à Michelstadt, où un certain Andreas Emmerich ouvrait les portes de sa maison à des espérantistes. Herr Emmerich était directeur d'une école de rattrapage scolaire. Je l'ai rejoint à l'école. En chemin, je suis tombé en amour avec Michelstadt : Grande Ville, en ancien allemand. C'était une ville du Moyen-Age, dont le centre était encore intact... même les pavés !

Herr Emmerich et son amie de cœur, Sandra Hollmann, hébergeaient déjà un Polonais de passage, mais ils m'ont

quand même accueilli avec plaisir. Pendant les premières journées de mon séjour, j'ai constaté que l'espéranto peut aussi être vécu au quotidien, comme n'importe quelle langue nationale. Et dans le cas qui nous intéressait, il était indispensable : deux Allemands, un Polonais et un Québécois sous le même toit ! J'ai aussi compris la richesse de l'espéranto : quel plaisir de pouvoir demander directement à un Polonais comment il percevait l'Union européenne ! En anglais, nous aurions perdu notre temps.

Mais après le départ de Daniel, le Polonais, je me suis mis à parler allemand avec Andreas et Sandra. Puis Andreas m'a demandé de remplacer un professeur de français malade. Vu le succès que j'ai obtenu auprès des

...Memorajoj...

plezuro de la vivo. Petro estis ne nur sperta muzikamanto, konsiderema aŭskultanto, sed ankaŭ diplomito de la Lieĝa Konservatorio pri violono kaj piano. Li ludis tre bone la pianon kaj havis rimarkindan facilecon por deĉifri partiturojn. Lia muzikeco estis vibra kaj aŭtenta. Bedaŭrinde, de kelkaj jaroj, li rifuzis ludi pianon, ĉar liaj manoj suferigis lin kaj malhelpis la perfektecon, al kiu li strebadis en sia ludado, kiel cetere en ĉio, kion li entreprenis.

Kasedinterŝanĝado

Trefleo Mercier

Mi memoras pri unu el la aktivecoj de SES dum la 80^{aj} jaroj, kiam nia loka klubo estis plej vigla. Ni estis estigintaj korespondajn ligojn per aŭdkasedoj kun kelkaj E-klubo tra la mondo. Estis okazo aŭdi la lingvon, ofte koloritan de regiona akĉento, dum ni lernis faktojn pri la moroj de tiu lando kaj pri la funkciado de la koresponda klubo.

élèves, il a été décidé que je resterais jusqu'à la fin des cours pour donner des classes de français.

C'est ainsi que je suis resté en Allemagne pendant deux mois, sans le sous mais doté d'une langue qui m'ouvrait la porte de la fraternité mondiale. Cela semble exagéré, mais je me souviens encore trop bien des discussions sociales et politiques que nous avons tenues en espéranto, je me souviens trop bien du contact direct avec des gens qui, à l'autre bout du monde, parlaient cette même langue, qu'un jeune Juif russe a un jour inventée dans l'espoir qu'un jour, tous les peuples se comprennent.

Je me souviendrai toujours des mots fétiches de mes amis allemands : Andreas qui disait toujours *Terura sekvo...*

Por ni tiu aktiveco estis tre serioza afero kaj ĝi postulis multe da preparlaboro. Ni plej ofte kuniĝis ĉe Petro en sia domo de Rock Forest kie, en la subtegmento, li havis je sia dispono ĉiujn necesajn aparatojn por ludi muzikon kaj registri.

Tiuj interŝanĝoj permesis al ni estigi solidajn ligojn kun certaj kluboj, inkluzive unu en Svedio. Ni avidis aŭskulti la voĉojn de tiuj, kiuj fariĝis kutimaj. Geraldo Côté kaj Bruno Pelletier ricevis grandan surprizon kiam ili estis alpaŝitaj de Svedo dum la Vankuvera U.K., kiu deziris transdoni, nome de nia Sveda koresponda klubo, suveniran tablotukon al la Ŝerbruka grupo ! Anglino, kun kiu ni korespondis, ankaŭ kontaktis ilin dum la sama kongreso.

Kiel okazas al multaj klubaj aktivecoj, tiu de la interŝanĝado de kasedoj iam ĉesiĝis, sed ĉiufoje kiam ni remetas la Svedan tablotukon, varmaj memorajoj surfaciĝas, inter ili la gajaj registro-sesioj en la subtegmento de Petro Collinge.

En 1998, Esperanto-Societo Kebekia (ESK) bonvenigos en Montrealo la Nord-Amerikan Esperantistaron. Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), Usona Esperanto-Junularo (USEJ), Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj Junularo Esperantista Kanada (JEK) akceptis okazigi siajn jarkunvenojn en Montrealo. Do, tuj notu en vian taglibron (se vi jam aĉetis ĝin por 1998) la verdajn datojn : 24^a-25^a-26^a-27^a de julio 1998.

La estraro de ESK jam aktivis prepari ĉion. Sed fakte kio okazos ? Nu, NAKE (Nord-Amerika Kongreso de Esperanto) estos la plej granda Esperanto-renkontiĝo en Kebekio de post la Internacia Junulara Kongreso en 1992. Do, krom la ebleco konatiĝi kun pli ol 100 esperantistoj el plej diversaj lokoj, vi povos sperti multon. Ekzemple, okazos diversaj prelegoj (seriozaj, fakaj kaj ankaŭ malseriozaj kaj malfakaj) estos amika interkona vespero, bankeda vespero kaj... koncerto de Kajto. Tiu ĉi muzika grupo kantas Esperante kaj jam koncertis tra tuta Eŭropo. Ili jam registris tri kompaktn diskajn. Tio estos certe belega travivaĵo aŭskulti profesion koncerton en Esperanto kaj tio en Montrealo !

Se vi ŝatus helpi en la organizado au dum la kongreso, tuj kontaktu min ((514) 495-8442 aŭ <normand.fleury@sympatico.ca>). Eĉ se vi estas komencanto en Esperanto, vi povos helpi. Ne forgesu ke tio estos bonega ebleco aktive praktiki kaj progresi en Esperanto.

La angla malpermesita

Ĝis nun, la angla lingvo estas instrulingvo en lernejoj en Hongkongo. Sed la nova Hongkonga registaro sub Ĉinio anoncis la 26^a de septembro ke, ekde venonta jaro, ĉiuj mezlernejoj, escepte de lernejoj por alilandanoj, devos uzi la ĉinan lingvon kiel instrulingvon. La registaro ne ŝatis la fakton, ke plej multaj mezlernejaj studentoj parolas « chinglish ». [LEE Chong-Yeong. El *Interredaktore*]

6 Vintro de 1997-98

J'ai participé à la *Atŭtuna Renkontiĝo Esperantista* à Okemo, du 11 au 13 octobre. Cela m'a permis de rencontrer plus de 60 esperantistes et d'échanger avec eux. La plupart provenaient du Québec et de l'État de New York, mais il y avait aussi un participant japonais, ainsi que quelques participants européens, dont l'invité d'honneur, l'auteur Claude Piron. Malgré le fait que j'aie commencé à apprendre l'espéranto quelques mois seulement avant la rencontre, j'ai pu quand même prendre part aux activités et bien comprendre le discours de Claude Piron et les interventions des autres participants, ce qui témoigne de la simplicité et de la logique de la langue... Il faut dire aussi que les cours de Bill Maxey m'ont été très bénéfiques : il fallait d'abord revoir la théorie (grammaire, vocabulaire...), mais c'était surtout pour moi une première opportunité de converser avec plusieurs autres espérantistes d'un niveau semblable au mien.

L'ambiance durant toute la fin de semaine était des plus agréables et m'a

convaincu que le grand principe de l'égalité qui est au cœur du mouvement espérantiste était vraiment mis en application. L'origine des participants importait peu, car l'usage de la langue internationale fait disparaître les différences. Bien que la plupart d'entre nous n'avaient pas une grande expérience musicale, on a même réussi à chanter en chœur (certes, nous avons dû être quelque peu harangués pour que l'harmonie règne... souvenons-nous du fameux cri : « KUNE !!! ») durant la soirée culturelle !

Même si je ne pouvais converser avec autant de facilité que les « vétérans », ce n'est pas la même barrière que dans l'apprentissage des autres langues. Au contraire, je suis revenu d'Okemo encore plus motivé à parfaire mes connaissances et à rencontrer d'autres espérantophones. Suite à cette expérience, Mario Duchesne et moi espérons d'ailleurs organiser des rencontres entre les espérantistes du Centre et de l'Est du Québec, particulièrement dans les régions de Québec, de Charlevoix et du Saguenay.

Lhasa de Sela, espérantiste ?

Dans un article du *Droit*, décrivant le spectacle donné fin novembre à Ottawa par la chanteuse Lhasa de Sela, que certains médias anglophones considèrent comme « a Canadian-hispanic Edith Piaf », on lisait que Lhasa, qui remercie son public en disant : « Merci, thank you, gracias », manifestait le désir de parler et d'adopter l'espéranto (présenté comme une « langue internationale conventionnelle »), question de ne plus avoir à choisir comment s'adresser aux gens. [*Le Droit*, 27 novembre 1997]

...L'espéranto : Jawohl !

afero ! quand il était excédé et Sandra qui m'appelait son *ŝercemulo* quand elle riait de mes plaisanteries.

Après, j'ai dû prendre mon vol de retour à partir de Paris. Laissez-moi vous dire que je riais volontiers de tous les voyageurs que je voyais passer dans les hôtels : incapables de prononcer l'anglais correctement, des Scandinaves, des Coréens et des Chiliens

devaient s'évertuer à s'expliquer avec des employés français qui leur demandaient bien candidement *Ouate douïouwaaant* ? avec leur anglais à coucher dehors. J'étais aussi désolé pour eux : en espéranto, tout serait tellement plus simple...

Mi ankaŭ volas danki Tamaran kaj Sebon : vi donis al mi kuraĝon kaj vi permesis al mi malkovri la aventuron. Dankon !

Vendredaj renkontiĝoj

Programo de 1998

Ivano Roux

Antaŭ ol paroli pri la programo de 1998, ni ŝatus inviti ĉiujn partopreni la **Zamenhofan feston**, kaj feston pri la **15-jariĝo de ESK**, kiu okazos sabaton 20^{an} de decembro ekde la 18^a horo, en la Montreala Esperanto-Domo, 6358-A, rue de Bordeaux, en Montrealo (metrostacio Beaubien aŭ Fabre). Venu kiel eble plej nombre **renkonti Ludovikon Lazaron Zamenhof mem !!!**

Ni ŝatus ke, post tiu vespero, ĉiuj el ni iom pli sciu pri la iniciatinto de Esperanto. Ni jam fervore zorgas pri tiu **programo**, kiu certe estos memorinda. Vi distriĝos bone, en bona kunesto. Se vi havas ideojn rilatajn kun Zamenhof, aŭ kun lia epoko, aŭ se vi volas helpi aliajn realigi iliajn ideojn, telefonu al mi : (514) 523-1604.

Okazos nia tradicia decembra **komuna manĝo**. Vi povas kunporti de vi ŝatatan pladon, sed ni instigas tiujn homojn, kiuj havas tiun eblecon, kunporti **pladon rusecan** aŭ orienteŭropecan, por plu ĝui la zamenhofan mondon.

Zamenhof kalkulas je via ĉeesto...

Programo de la Montrealaj Esperanto-Kunvenoj

Algluu sur vian fridujo !

Dato : vendredo 23^a de **januaro**, 19h.
Loko : Le Forum, 920, rue Saint-Zotique, metroo Beaubien.
Telefono : Ivano, 523-1604.
Programo : kegloludado. Post la ludo, ekde la 21h, diskuto pri aidoso, en la proksima Montreala Esperanto-Domo.

Dato : vendredo 13^a de **februaro**, 19h.
Loko : Parko Lafontaine, frostita lageto, preter la avenuo du Parc-Lafontaine, inter la stratoj Rachel kaj Sherbrooke. Metroo Sherbrooke.
Telefono : Ivano, 523-1604.
Programo : glitkurado ; poste, varma teo kaj sociaj ludoj, ĉe l' proksima domo de Jean-Claude : 3776, rue de Mentana (524-9064).

Dato : sabato 14^a de **marto**, 19h30.
Loko : ĉe Silko (Sylvain Quirion), 2068, rue Saint-Christophe, app. 3, metroo Sherbrooke, (514) 596-2178.
Programo : sciencaj eksperimentoj, teatraj ludoj.

Dato : vendredo 17^a de **aprilo**, 19h30.
Loko : ĉe Silvano kaj Marta, 3791, av. Linton, app. 3, metrostacio Côte-des-Neiges aŭ Plamondon, (514) 731-3295.
Programo : kia estos la venonta jarcento ; edukado de infanoj.

Dato : vendredo 22^a de **majo**, 19h30.
Loko : ĉe Normando kaj Zdravka, 6358-A, rue de Bordeaux, metroo Beaubien aŭ Fabre, (514) 495-8442.
Programo : kiel praktike pretigi ĝardenon.

Dato : vendredo 19^a de **junio**, 18h.
Loko : malnova haveno, en Vieux-Montréal. Kuniĝo de l' partoprenantoj apud la enirejo de l' koridoro al kinejo Imax.
Informoj : Ivano, 523-1604.
Programo : pikniko en la malnova haveno ; amuziĝo en la festivalo Juste pour rire.
Prezo : ĉirkaŭ 4 \$ por laŭplaĉa nombro

de horoj en la festivalejo. (Vi povas eniri pli frue dum la tago, eliri por pikniki kun ni, kaj senpage reeniri).

Se iu esperantisto ŝatus akcepti la aliajn ĉe sin dum vespero kaj organizi la programoj, ne ĝenu vin kaj telefonu Ivanon, 523-1604. La etoso de tiuj vesperoj (jam tri pasis) estas tre amikeca, kaj ĉiuj emas babili, do la programo povas esti tre simpla. Vi povas ekzemple inviti nin prepari diversspecajn kukojn, aŭ partoprenigi nin en ludo, aŭ paroli pri temo, kiu interesas vin. Kaj, ĉe la fino de l' vespero, vi povos esti la unua en la lito, ĉar vi estos jam hejme !

Rencontre pour la Saint-Valentin

Martin Lavallée

KEJO (ou OJEQ : Organisation des jeunes espérantistes du Québec) organisera une rencontre amicale durant la fin de semaine suivant la réunion mensuelle des espérantophones montréalais du vendredi 13 février, soit les 14 et 15 février. Au programme : sorties en plein air, sports divers — en fait, il dépendra surtout de votre humeur et des idées que vous pourriez avoir et que nous ne pouvons pas deviner...

Pour faciliter les préparatifs, vous êtes priés d'écrire à <esperanto@mailexcite.com> ou encore à :
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal H2G 2R8
téléphone et télécopieur : (514) 272-0151

Kalendaro de venontaj okazajoj

20^a de decembro. Montreala Esperanto-Kunveno, ĉe Normando kaj Zdravka. **Komuna vespermanĝo** k.ĉ.

26^a ĝis 31^a de decembro. Kvina **Togolanda Esperanto-Kongreso**.

27^a de decembro ĝis 3^a de januaro. 14^a **Internacia Festivalo** por mezaĝuloj kaj junaj familioj, en Trier (Germanio).

27^a de decembro ĝis 3^a de januaro. 41^a **Internacia Seminario**, en Traben-Trarbach (Germanio). Temo: *Socio kaj komunikado*.

23^a de januaro. Montreala Esperanto-Kunveno. **Kegoludado kaj diskutado** ĉe la Montreala Esperanto-Domo.

13^a de februaro. Montreala Esperanto-Kunveno. **Glitkurado** en Parc Lafontaine, varma teo ĉe Jean-Claude Bélanger.

14^a kaj 15^a de februaro. **Amika Renkontiĝo de KEJO** (Kebekia Esperantista Junulara Organizo), en Montrealo.

22^a ĝis 28^a de februaro. Semajno de **Internacia Amikeco**.

26^a de februaro ĝis 7^a de marto. 2^a **Internacia Himalaja Renkontiĝo**, en Nepalo.

14^a de marto. Montreala Esperanto-Kunveno, ĉe Sylvain Quirion. **Sciencaj eksperimentoj, teatraj ludoj**.

8^a ĝis 14^a de aprilo. 22^a **Internacia Junulara Festivalo**. En Lignano Sabbiadoro (Italio).

17^a de aprilo. Montreala Esperanto-Kunveno, ĉe Sylvain Auclair kaj Márta Dikman. Edukado de **infanoj**, rigardo al la **venonta jarcento**.

22^a de majo. Montreala Esperanto-Kunveno, ĉe Normand Fleury. Kiel praktike **pretigi ĝardenon**.

19^a de junio. Montreala Esperanto-Kunveno. Pikniko kaj promenado en la **Malnova Haveno**.

18^a ĝis 25^a de julio. 20^a **Renkontiĝo de Esperanto-Familioj**. En Mosonmagyaróvár (Hungario)

24^a ĝis 27^a de julio. **Nordamerika Kongreso de Esperanto**, en Montrealo.

1^a ĝis 8^a de aŭgusto. **Universala Kongreso**, en Montpeliero (Francio). Temo: *Mediterraneo — ponto inter kulturoj*.

1^a ĝis 8^a de aŭgusto de 1999. **Universala Kongreso**, en Berlino (Germanio).

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazajoj : (514) 272-0151.

Marjorie Boulton ricevas Esperanto-Kulturpremion

Stefan Maul

La prestiĝan Esperanto-Kulturpremion de Aalen en 1998 ricevos la renoma Esperanto-poeto Dro Marjorie Boulton. Tion ĵus decidis FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj. Ŝi ricevos la sesan premion en valoro de 10 000 germanaj markoj pro siaj meritoj pri literaturo, scienca agado, edukado kaj kontribuoj al humaneco kaj interkompreno.

La literatur-scienisto Boulton, (nun emerita) docento en fama Oksfordo, publikigis ne nur multajn poeziajn volumojn sed ankaŭ valorajn lernolibrojn kaj krome dum multaj jaroj gvidis la prestiĝan Esperanto-somerlernejon en Barlastono, kiun ŝi per granda engaĝiĝo kondukis al alta nivelo. Kiel sciencisto ŝi elstaris per multaj brilaj prelegoj kadre de la Internacia Universitato dum Universalaj Kongresoj kaj dum vojaĝoj tra multaj landoj; ĉiam ŝi sukcesas fascini sian auskultantaron kaj per polurita stilo kaj per eksterordinara enhavo. FAME-prezidanto kaj fondinto de *Monato*, Stefan Maul, aldonas: « Ni krome agnoskas per la premio ŝian ĵurnalistan agadon, precipe en *Monato*, kie ŝi aperigis abunde interesajn artikolojn pri ofte nekutimaj temoj; ŝi scias verki pri ŝajnaj bagateloj de l' homa vivo pensigajn kaj amuzajn kontribuojn. Marjorie Boulton neniam tedas! »

Tamen, kiel emfazas Maul, oni honoras per la kultur-premio precipe ŝian poezion: « La tutan verkaron de Marjorie Boulton distingas profunda humaneco, kiu tute konforme al la FAME-statuto spiras toleremon kaj interkomprenon. » La solena matineo en la urba biblioteko de Aalen, kie troviĝas ankaŭ la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto, okazos probable dum printempo 1998; preciza dato ne jam estas fiksita. Marjorie Boulton estas la tria virino, kiu ricevas la kultur-premion, post Ada Fighiera-Sikorska kaj Spomenka Ŝtimec. Premiito estis, cetere, ankaŭ la ĵus mortinta poeto Rikardo Ŝulco. [El *Interredaktore*]

Lingvo Esperanto ne plu necesa ?

Pasint-monata radioelsendo de la *Voĉo de Ameriko* informas ke la usona firmao *Gaya*, ĵus anoncis la lanĉon de *Universala Tradukilo*, kiu ebligas al usona turisto en, ekzemple Tajlando aux Ĉinio, komuniki kun iu ajn sen ia ajn problemo. Se vi imagis grandegan libron aŭ komplikan kaj multekostan elektronikan aparaton, vi eraris. La *Universala Tradukilo* estas samgranda kiel vojaĝ-bileto (sed ekzistas ankaŭ modelo por monujo), kaj kostas nur ses usonajn dolarojn. Kio estas la sekreto? Bildoj! Ĝi estas faldebla karto kun centoj kaj centoj da desegnaĵoj pri ĉio imagebla. Estas troveblaj manĝaĵoj, aŭtoj kaj eĉ kondomo... De nun, ĉio kion turisto faru, estas voki iun ajn sur la strato, montri la taŭgan bildon, kaj rideti... [R. Resende. El *Interredaktore*]

La subskriboj por la **Manifesto de la Esperanto-Movado**, lanĉita en la UK en Prago en 1996, eniris la duan dekmilon. Fine de novembro la suma nombro estis 10391. La Centra Oficejo de UEA daŭre akceptas subskribojn kaj disponigas por tiu celo presitajn listojn (por 20 nomoj) kaj poŝtkartojn (por 4 nomoj).

UEA baldaŭ eldonos studlibreton, kiu enhavos po unu artikolon pri ĉiu ero de la Manifesto. Ĝia celo estas pliprofundigi la konon de la Manifesto. Krom por memstudado ĝi taŭgos tre bone kiel bazo por diskutoj en kluboj, konversaciaj rondoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj.